

# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

## Zikmund Skyba: Veš mezi dvěma nehty

Československo je zemí, která má i mezi esperantisty v různých částech světa znamenitý kurs a velmi dobrý zvuk. Ten zájem dokonce stále stoupá. Je tomu jak proto, že jsme na celém světě mezi pokrokovými zeměmi. Ze se o nás hodně ve světě mluví i neesperantskými jazyky. Ze je nám práno, ale ovšem i nepráno. Když byla loni v červnu na sjezdu našich esperantistů v Liberici švýcarská Francouzka pani Fragonnaraová, pravila kromě jiného: »Byla jsem zrazována, abych k vám nejela. Ze se u vás dějí podivné věci. Nepostechia jsem. A co teď musím říci, když jsem viděla vaši zemi? To, že je sice pravdou, že Švýcarsko je ráj na zemi, ale jenom pro bohače. Kdežto u vás si buďte ráj dělníku...« Jedou-li naši esperantisté na esperantské kongresy v cizině, jsou rovněž vždycky středem zájmu. A tak na příklad na lonském kongresu v Bournewouthu v Anglii hovořil s československými delegáty Egypťan a leccos se mu na Československu nelíbilo. Byl tedy zván k nám. Aby jel nazpět do své vlasti přes Československo. Poškrabal se v černých kučerách a zavřel hlavou: »Jo kdybych udělal, víckrát bych se nesměl vrátit do Egypta...« Usmáli se naši delegáti a v debatě o tom, co se komu na kom nelíbí, se mohlo pokračovat; jenomže Egypťan už nemohl tvrdit, že by v jeho zemi byl člověk svobodný.

Není ovšem, co se esperanta týče, Československo na programu jen na sjezdech a kongresech samideanů (jak si totiž esperantisté navzájem říkají). Hovoříme z pražského rozhlasu esperantem na vlnách krátkých, dlouhých i středních a hojně si naši esperantisté se svými esperantskými přáteli jinde dopisují: I v takové vozovně na Žižkově je plný kroužek esperantistů-tramvajáků. Ani nechťejí být nikdy jmenování jednotlivě. Dopisování s dělnickými esperantisty a často rovněž tramvajáky v jiných městech na světě je jejich kolektivní prací i potěšením a mnoho z něho mívají žižkovští tramvajáci vůbec. Jim totiž členové kroužku na schůzích rádi referují, co se ze světa dověděli. Dopisují si s Vídní, Peští, Drážďanami, se Sofií i Marseillí, s Rotterdamem a Amsterodamem, s Glasgovem a Sheffieldem, s Oslo, Göteborgem a Stockholmem, ale i ještě s Adelaidou až v Australii. Jak je patrné, je tu kromě rozmanitosti i rozličnost. Není dnes svět jako svět. Sofia a Pešť leží kdesi jinde, než Rotterdam, Oslo, Glasgow nebo švédský Göteborg. Odlišují se tedy i dopisy, které dostávají žižkovští tramvajáci od svých přátel z různých měst.

Když před časem rozesílali do světa v příloze svých odpovědí esperantský text naší ústavy, nereagovali přirozeně příjemci brožury stejně, ačkaliv všichni děkovali. Přátelé ze Sofie a z Pešti byli potěšeni jejím zněním a rozepsali se o budovatelských ústavách svých zemí. Přátelé z několika měst na tak zvaném evropském západě jen mezi řádky litovali, že si v jejich zemích lid ještě takovou ústavu nemohl odhlasovat. Ale na příklad holandský samideano L. začal zarputile vyčítat. To i ono zkřížoval — s hlediska svého koženého sociálně demokratického reformismu — a

velmi hluboko v žaludku mu zůstaly ležet — volby. »Máte ve čtvrtém článku vaší ústavy,« psal, »že je každému občanu zaručena svoboda při volbách. Vaše poslední volby však svobodné nebyly...« Žižkovští tramvajáci ze široka, bod za bodem, oapovídali holandskému příteli, vezicimu v zajeří kapitalistického a reformistického myšlení. Vyvrátili všechny jeho námitky a kritiky. Usvědčili ho, že si jinak vykiááá svobodu, jde-li o Holandsko, a jinak, jde-li o Indonésii, o níž předtím právě psal: »Dali jsme do Indonésie peníze, musíme je přece dostat zpátky.« Dopodrobna mu vyložili svobodný výkon voleb u nás i celé naše pojetí tohoto občanského vysostného práva a stavěli vedle příklady »svobodných« voleb jinde ve světě, i v té Americe na příklad, kterou přítel L. velebil za Marshallův plán, jež prý Holandsko bylo povinno podepsat, aby nehladovělo. Holandský přítel napříště psal trochu jinak, než předtím. Ještě pořád se rozepisoval o těch volbách, ale i v jiných věcech mu pořádně svítilo. Dal se přesvědčit.

Ale nejsou zase ani všude na »západě« lidé jako holandský přítel L. Co napsal v hustém čtyřstránkovém psaní žižkovským tramvajákům dělník T. z Oslo? »Zpívají se nám tu lahodné melodie o lidských právech, o volnosti, o osvobození od strachu, ale přitom se jen přede pavučí síť, v níž mají uváznout ti, kdo uvěří. Především Marshallův plán a atlantický pakt jsou takovými pavučinami... Ti lidé u nás, kteří jsou ještě dnes toho mínění, že Amerika obětuje miliardy dolarů pro zmírnění bídy proto, že má dobré srdce, ztratí v budoucnosti tyto iluze. Ta chce vydělat na konkursních státech a výhodně především zpeněžit zbraně a munici... Chce nás zviklat v důvěře v Sovětský svaz, nechce, abychom se nijak nebáli »ruského medvěda« a proto se nám snaží dávat ze svého »rohu hojnosti«...« Takto tedy píše československým přátelům norský dělník. Tak píše on za zdravé jádro norského lidu. Tak píše a je i ve svých přirovnáních a obrazech lidově hutný, zrnitý a jadrný. »Angloamerické listy sice uveřejňují dlouhé články o hrdině norském lidu, ale jak se přitom dívají na naši zemi, která má kolem tří milionů obyvatel? — klade si v dopise otázku dělník T. z Oslo. »Pohlížejí na nás jako na — veš mezi dvěma nehty!« Doslova tak píše norský esperantista. Esperantsky zní tento výstižný obraz: »Pediko inter du ungoj.« Člověk z něho přímo cítí to lupnutí. Vidí ruce imperialismu, které se natahují a říkají »Na!«, ale už zároveň chystají nehty, aby ten či onen »parasitní« nárudek rozdrtily.

A jak tedy hned také uvědomělý Nor přijal naši ústavu? »Ze srdce souhlasím s jejím obsahem, který směřuje k neuzší spolupráci s jinými státy, které již jsou a které budou osvobozeny od fašistického kapitalismu...« Tyto řádky jsou naplněny vírou. Dělník T. z Oslo plným právem věří, že i norský lid se osvobodí. Ze všichni norští dělníci, i ti, dosud nepoučení, jejichž neuvědomělost zároveň omlouvá, prohlédnou a odhalí, jak píše, že »angloamerický kapitalistický tisk je vlastně jako lumík který stále řve svoje: »vraždím — vraždím!«

Svět práce 3. VIII. 1950.

# Du internaciaj kongresoj esperantistaj

La 35-a Universala kongreso en Parizo.

Tiu ĉi kongreso la 5—12-an de aŭgusto kunvenigis 2325 aliĝintojn el 36 landoj. Tio estas nombro tre impona precipe, se oni ne forgesas, ke el pluraj landoj ne povis veni esperantistoj pro valut-politiko de siaj landoj. Ankaŭ nia lando ne povis esti reprezentita. En la solena malferma kunveno salutis la kongreson delegitoj de registaroj franca (ministrejoj por edukado kaj por komerco), aŭstria, belga, brazila, nederlanda, norvega, sveda, urugvaj. En nomo de la naciaj asocioj salutis la kongreson delegitoj el Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio (francilingva kaj flandra), Brazilo, Britujo, Danlando, Egiptujo, Finnlando, Francujo Germanujo, Greklando, Hispanujo, Irlando, Izraelo, Italujo, Jugoslavio, Maroko, Nederlando, Norvegujo, Novzelando, Svedlando, Svislando, Usono.

La festparolado de Dro Ivo Lapenna entuziasmigis la aŭskultantaron en grado jam longe nespartita dum la kongresoj; precipe kiam li citis vortojn de Zamenhof, ke ni ne kunvenas kiel fremduloj kun fremduloj sed kiel homoj kun homoj.

Por la laboro la kongreso partigis sin en kvar sekciojn: Esperanto en la lernejoj, Scienco kaj tekniko, Internaciaj intelektaj interŝanĝoj, Internacia trafiko kaj komerco. Ĉiuj sekcioj estis tre bone vizititaj, plej multe la lerneja, kie ĉeestis lunde 230 geinstruistoj. UEA-sekretario C. C. Goldsmith sendis jam (kun dato 29. aŭg.) al la landaj Asocioj raporton pri la sekcia agado. Ĝi estas zorge redaktita kaj konsistas el rezolucioj akceptitaj post raportoj. Ili estas ĉiuj kompilitaj tre zorge, sed iam tro teorie kaj ne sufiĉe komplete. Ekz. en raporto pri lernejoj estas donitaj ciferoj pri tri landoj. En Britujo lernas en 21 duagrada lernejoj 1500 studentoj, en Nederlando en 33 lernejoj ĉirkaŭ 1000 infanoj, en Francujo 700 geinfanoj inter 12 kaj 18 jaroj. Brita E-Asocio estas unika en tio, ke ĝi havas Edukan Sekretarion, kiu responde al invitoj kaj sen pago faris pasintjare provlecionojn aŭ mallongajn kursojn en 60 lernejoj en Anglujo. La raporto brita komentas, ke la interlerneja korespondado ofte estas mallonge daŭra iam pro deziro uzi Esperanton por lerni la anglan lingvon. En Francujo kolektiva korespondado estas tre populara, kaj rezultigas iafaje feliĉajn sekvojn. Ekzemple dek knaboj el franca lernejo aranĝis viziton al tirola vilaĝo, kie loĝas iliaj korespondamikoj. »Estas tre verŝajne, ke tiuj knaboj, interfratiginte sur la belaj kampoj de Tirola, ne volonte interbatalos sur sanga batalejo en la estonteco.« Ni miras, ke en la raporto ne enestas la ciferoj pri nia lando, kiuj estis publikigitaj en nia Raporto pri agado 1949 kaj senditaj al ĉiuj landaj Asocioj kaj cititaj en raporto sendita al UEA de nia ĝen. sekretario. Laŭ ĝi dum la lernejjaro 1949/50 ricevis instruadon de E. en siaj lernejoj 228 studentoj en 11 lernejoj. Proporcie al nombro de nia loĝantaro ĝi estas preskaŭ same granda kiel en Francujo—Sekcio dua por Scienco kaj tekniko resumis sian agadon en rezoluciojn kiu konstatas, ke grandiĝas nombro de sciencistoj kaj teknikistoj aperigantaj sciencajn verkojn en Esperanto aŭ aldonaĵoj esperantlingvajn resumojn al siaj verkoj, kaj ke aperis jam ĉirkaŭ 110 fakaj terminaroj. Post siaj konstatoj la rezolucio »decidas« tio signifas rekomendas aŭ konsilas en 15 paragrafoj diversajn manierojn, por akceli enpenetron de E. en sciencajn rondojn. Tiuj konsiloj estas bedaŭrinde tro teoriaj kaj plejparte neefektiveblaj, aŭ tro memkompreneblaj (ekz. ke aŭtoroj de faktinaroj interkonsiliĝu kun samfakuloj en diversaj landoj). La plej konkreta estas rekomendo, ke landaj sekcioj de la Internacia Scienca Asocio Esperantista entreprenu grandskalan enketon inter universitataj profesoroj kaj aliaj sciencistoj por akiri liston de nacilingvaj verkoj, kies valoro kaj universaleco nepre postulas, ke ili estu tradukitaj en Esperanton. Surbaze de tiu enketo havos la kunveno de la sekcio en 1951 bildon de libroj tradukindaj kaj povos esplori eblecon realigi sugeston de Prof. Bernard Lavergne el la Pariza Jurfakultato, ke ĉiu ŝtato devontigu sin eldoni ĉiujare po 50 plej valoraj libroj en esperantlingva traduko. — Tria sekcio (pri Internaciaj intelektaj interŝanĝoj) konsilas, ke UEA publikigu la plej bonajn verkojn originalajn kaj tra-

dukitajn en kadro de Beletra Suplemento al »Esperanto« aŭ ĉiujara Almanako, ke UEA diskonigu al modernaj medioj avantaĝojn, kiujn la kritikistoj povas trovi en la Esperantaj antologioj, ke esperantistaj grupoj fondadu teatro-fakojn, ke ĉiuj Esperantaj radiostacioj pligrandigu la nombron de artaj programoj. Ni citis el la viĉo de konsiloj tiujn, en kiuj enestas io nova aŭ konkreta, ne ĉiam ripetata. Al paragrafo pri Radio ni volonte rimarkigus, ke etikas strange kaj partieme, se oni ne citas Ĉeĥoslovakion, kies informministerio uzas Esperanton por informi fremdlandon pri ĉeĥoslovakaj vidmanieroj kaj situacioj en amplekso neniam ĝis nun spertita. Vidigas danĝeran miskomprenon de la situacio, se oni postulas pli da »artprogramoj« anstataŭ tiu ĉi informa kaj konvinkema servo. Neniu ja elradios kilovatojn sole por priklari printempajn belecojn. Sed iu riskos tion por prediki tion, kion li pensas grava kaj utila al la ceteraj. Tial rajtis nia ministerio atendi pli da entuziasmo pure esperantista ĉe esperantistaj gvidantoj. Tial nia ministerio rajtas atendi entuziasman kunlaboradon ĉe multaj aŭskultantoj. Nur tiam Esperanto enpenetros en Radion, se ĝi servos al iu ideo, al iu ideo nova, ne agnoskata de ĉiu, ĝuste tial ĝiaj konfesantoj kaj kredantoj informas pri ĝi kaj propagandas ĝin. Kiu venas kun nova verŝajne nek povas nek rajtas esti neŭtrala. — Kvara sekcio temis pri Internacia trafiko kaj komerco. Ĝiaj konkludoj rekomendas uzon de Esperanto en koncernaĵoj fakoj kaj enlistigis ilin sinoptike. Meritas citon deziresprimon, ke oficistoj de la komunikaj kaj transportaj servoj, uzantoj de tiuj servoj, kaj oficistoj de gardaj servoj de la ŝtatoj kunagadu por eldoni komunan, gravan, seriozan revuon.

La partigo de la kongresaj laboroj en kvar sekciojn estis eksperimento, kiu alportis tiujn 9 paĝojn de rezolucioj, ne tro novaj laŭenhave. Sed krome tiu ĉi aranĝo certe ankaŭ ebligis pli intiman interkonatiĝon personan de laborantoj ol ĝi estis ebla dum la kutimaj laborkunsidoj de la tuta kongreso. Estas verŝajne, ke venontjare estos tiu ĉi ebleco uzita ankoraŭ pli intense kaj ke oni konservos konstatojn de spertoj pli principiaj. Ekzemple en nia nacia kongreso en Brno (kie kunvenis mil samideanoj) kunveno de kursgvidantoj kaj instruistoj venis al konkludo, ke instruado de Esperanto en lernejoj al infanoj 10—16 jaraĵoj alportas utilon nek al la movado nek al la studentoj. Esperantistoj fariĝas nur el junuloj lernintaj la lingvon nur ĉirkaŭ 18 jaroj. Ĉu neniu en la unua sekcio diris similiajn spertojn aŭ konsiderojn? Ĉu neniu legis liniojn pri tio en nia raporto?

La distra programo de la kongreso estis ankaŭ tre bona. La internacia balo estis jam mardon, en du salonoj de la sama palaco samtempe, Varietea vespero, kabaretaj vesperoj de Raymond Schwartz, »Nokto de viroj« kaj finfine (pro Urbo de Lumo mem) programoj estis pli ol sufiĉantaj.

Sed la kongresanoj estis tre avidaj pri klerigo kaj scio ĝenerale. Somera universitato ĉiam allogis multajn aŭskultantojn. Jen la temoj: La serumo de la vereco (Prof. G. Canuto, dekano de medicina fakultato en Parma), Jura signifo de la Universala deklaro pri la homaj rajtoj) Dro Ivo Lapenna, profesoro pri internacia publika juro ĉe la jura fakultato en Zagreb), Evolufozoj de la mondekonomio (L. Laurat, profesoro de politika ekonomio en Parizo), Statistikaj miskomprenoj (Dro Olav Reiersøl, profesoro pri matematiko ĉe Universitato Oslo), Psikologia apliko de koloroj (Dro Nijvelt, Amsterdam), La problemoj de Hamleto (Reto Rossi, Skotlando). Estas edifante legi tian liston. Eble oni povas sekvi la konsilon de la 2-sekcio kongresa kaj eldoni la prelegojn baldaŭ kun tiuj de la prelegserio en Bornemouth.

La plej grava decido de la pariza kongreso estis akcepto de sekvanta rezolucio pri paco:

»La internacia lingvo — estante ne nur teknika rimedo de pensado kaj komunikado, sed ankaŭ potenca instrumento de proksimigo de la homoj en la mondaj kadroj — estas esence ligita al tutmonda paco kaj al amikecaj rilatoj inter la popoloj.

Tial la 35-a Kongreso de Esperanto forte subtenas ĉiujn sincerajn klopodojn por sekurigi la pacon kaj atendas, ke

ĉiuj pacamantoj dediĉos la merititan atenton al la internacia lingvo, la grava antaŭganto de internacia solidareco.»

Ni menci ankoraŭ, ke ankaŭ la resonado de la kongreso inter ne-esperantista publiko estis granda. Loka Kongresa Komitato eldonadis ĉiutage Gazetservon franc-kaj esperantilingvan, la kongresanoj estis oficiale akceptitaj en la urbodomo, speciala delegacio kongresa (ĉ. 50 personoj) vizitis Unescon, kie bonvenigis ilin kiel unua estro de la eduka fako anglo Elvin esperantlingve.

Prezidis la kunvenojn Georges Warnier kaj Ernfrid Malmgren, la sekciojn prezidis D. Kennedy, Ivo Lapenna, L. Bastien, P. Petit.

Kaj ni finu per konstato, ke ni faris tiun ĉi raporton laŭ Hokajto en Heroldo el 21. aŭg. kaj laŭ la cititaj raportoj de la kvar sekcioj, kaj ke ĉiuj sciigoj pri la kongresa agado same pri la ekstera kadro konfirmas la impreson, ke tiu kongreso estas grava pruvo de daŭre kreskanta vivanteco de nia movado en tutmonda skalo.

### La 23-a kongreso de SAT en Torino.

Tiu ĉi kongreso la 30. VII. — 5. VIII. havis 371 aliĝojn, el kiuj ĉeestis 290 el 11 nacioj (Alĝerio, Aŭstrio, Belgio, Britio, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Italio, Nederlando, Svedio). Inter ili estis 80-membra karavano el Nederlando. El la programo meritas atenton precipe diskuto pri demokratio, inaŭgurita de k-do Sulski, kaj prelego de k-do Bartelmes pri »la kontribuo de SAT en la mondujiĝo«. En la kongreso estis unanime akceptita »gvidrezolucio«, kiu tekstas:

La 23 kongreso de SAT — pridiskutinte kaj aprobinte unuanime la Raportaron prezentitan al ĝi de la Plenum-Komitato kaj de la ceteraj instancoj de la Asocio, — substrekas, vid-al-vide de nova militdanĝero en la mondo, la volon de la SAT-anaro persisti en la kleriga kaj kultura tasko neinfluate de partitendencaj konsideroj, spite ĉiujn obstaklojn kaj malfacilojn; — petas ĉiujn SAT-anojn en la mondo meti siajn fortojn senlace je la servo de raciaj ideoj, kies disvolvigo akcelas la konstanta uzado de Esperanto, por malhelpi, sur la spirita kampo, la detruajn efikojn de la naciismo furiozanta ankoraŭ en la nuna tempo kun granda intenco kaj minacanta la homaron per novaj katastrofoj, ĉu lokaj konfliktoj, ĉu mondvastaj militoj; — denuncas ĉian socisistemon, kiu ebligas kaj favoras la eksoluatadon de l'homo fare de la homo, kaj kiu kontraŭas la racian organizadon de la homaro.

S. K.

### Transdono de UEA-petskribo el UNO.

Raportis pri ĝi Dr. W. Solzbacher al la Pariza kongreso en ietero, kiun ni represas pro ĝia graveco komplete:

La transdono de la UEA-Petskribo al la Unuigitaj Nacioj okazis hodiaŭ, la 2-an de aŭgusto, je la dua kaj duono posttagmeze en Lake Success, en la Konferenca Ĉambro N-ro 13 de la UNO-Sekretariejo. Kvar albumojn enhavantajn ĉiujn kolektivajn subskribojn kaj la plej aravaĵajn individuajn akceptis nome de UNO S-ro Benjamin Cohen, de Ĉilio, Helpa Ĝenerala Sekretario de la Unuigitaj Nacioj kaj Estro de ĝia Departemento de Publika Informado.

Ses membroj de la Esperanto-delegitaro faris paroladon en Esperanto kaj en anala, franca, hispana kaj rusa lingvoj. Nome de UNO la Helpa Ĝenerala Sekretario deziris plenan sukceson al la klopodoj de la Esperantomovado. Li promesis oficiale informi la Ĝeneralan Direktoron de UNESCO, S-ron Jaine Torres Bodet, pri la transdono de la Esperanto-Petskribo. Li diris, ke li komprenis preskaŭ ĉion, kion ses Esperantistoj — naskitaj en 4 diversaj landoj — diris en Esperanto. Li aldonis, ke la flueco, kun kiu ili parolis la lingvon, forte impresis lin. S-ro Cohen ankaŭ menciis, ke la Esperanto-eldono de la Universala Deklaracio de Hom-Rajtoj, preparita kaj eldonita de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko, troviĝas en la oficiala listo de eldonaĵoj de la Departemento de Publika Informado de UNO. S-ro Cohen dankis la Esperantistojn por ilia promeso labori por internacia kompreno, tiamaniere plifaciligante la klopodojn de la Unuigitaj Nacioj.

La programo de la ceremonio estis jena: S-ro Mark Starr, Eduka Direktoro de la Sindikato de Laboristoj pri Virinvestoj, Vicprezidanto de la Komitato de la Usona Registaro por Edukaj Interŝanĝoj, kaj Prezidanto de la Usona Delegitaro al UNESCO-Konferenco pri Edukado de Plenkreskuloj, okazinta en Danujo en 1949, parolis angle kaj Esperante, rakontante pri siaj propraj spertoj kun Esperanto en Japanujo, Rusujo kaj aliaj landoj. Li diris, ke facila kaj neŭtrala helpa lingvo ebligas internaciajn rilatojn al personoj sen-specialista lingva studado kaj ke Esperanto montris sian plenan taŭgecon por tiu celo. En la historio de la Esperanto-movado S-ro Starr certe restos konata kiel la unua Esperantisto, kiu faris paroladon en Esperanto en la centro de UNO.

La dua parolado estis tiu de D-ro William Solzbacher, Prezidanto de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko. Li parolis unue angle, poste france, kaj fine Esperante. »Nome de Universala Esperanto-Asocio kaj de la 16 350 212 personoj, kiuj individue aŭ per siaj organizoj subtenis la petskribon«, li petis la Unuigitajn Naciojn, ke ili atentu kaj studu la spertojn jam faritajn pri la praktika uzo de Esperanto kaj ke ili subtenu pli vastan aplikadon en la estonteco. D-ro Solzbacher menciis la plej gravajn individuajn kaj kolektivajn subskribojn kaj diris, ke, kvankam la grandaj asocioj kun centmiloj da membroj estas la plej gravaj, studo de la listo de malgrandaj asocioj subskribintaj montras la surprizan variecon kaj multflankecon de la intereso pri Esperanto. Uzante tri landojn kiel ekzemplojn, Norvegiujon, Brazilon kaj Japanujon, li montris tion konkrete. Li ankaŭ rememorigis la diskutojn pri Esperanto en la sama Ligo de Nacioj, dirante, ke la Raporto de la Ligo de Nacioj pri »Esperanto kiel Internacia Helpa Lingvo« (1922) meritas la intereson de la Unuigitaj Nacioj kaj ke la formulo uzita en Rezolucio de la Ligo de Nacioj de 1924, pri »Esperanto kiel praktika helpa lingvo por internaciaj rilatoj, flanke de la naciaj lingvoj uzataj«, eble estos inda de konsidero en la Unuigitaj Nacioj.

Sekvis paroladeto de S-ro Myron Mychajliw, en rusa lingvo kaj Esperanto. Poste S-ro Floreal Conchado, Fak-Delegito de UEA por hispanlingvanoj, paroladis hispane, angle kaj Esperante.


Profesoro Joabo B. Mello e Souza, el Rio de Janeiro, Prezidanto de la Brazila Skolta Asocio kaj iama Ĝenerala Sekretario de la Brazila Esperanto-Ligo, faris treege impresan paroladon, unue en franca lingvo, poste en Esperanto, montrante la necesecon de Esperanto por lando, kies lingvo ne estas multe studata eksterlande.

La finan paroladon faris S-ro H. Sloan, Prezidanto de la Konsila Komitato de EANA. Li parolis unue en Esperanto, poste en angla lingvo, kaj laŭtlegis la tekston de la Petskribo. Li diris, ke la Esperanto-movado ne nur prezentas peton al UNO, sed ke ĝi ankaŭ promesas sian helpon en la plifaciligado de internacia kompreno, unu el la esencaj taskoj de UNO.

Sekvis la transdono de la Petskribo kaj la fina parolado de S-ro Benjamin Cohen. Ĉeestis kelkaj ĵurnalistoj. Ilia nombro estus estinta multe pli granda, se ne samtempe sensenca kunveno de la Sekurec-Konsilantaro sub la prezido de la Rusa Delegito, S-ro J. Malik, estus alti-rinta ilin.

Krom la 6 esperantistoj — naskitaj en 6 diversaj landoj — kiuj faris la paroladojn, la jenaj personoj ĉeestis kiel membroj de la Speciala Delegitaro por la Transdono de la Esperanto-Petskribo: James D. Sayers, Komitatano de UEA, Harry Harrison, Kasisto de EANA, Fak-Delegito de UEA, Gilbert Nickel, Estrarano de EANA, Delegito de UEA, Donald Stephens, Deleaito de UEA, George W. Bailev, Prezidanto de American Radio Relay League (asocio de 40 000 radio-amatoroj), membro de la Konsila Komitato de EANA, Komandanto Richard E. Lambert, fama mondvojaĝanto kaj unu el la unuaj Esperantistoj en Usono, Alfonso H. Correa, el Brazilo, oficisto de Pan-Amerika Unio kaj aŭtoro de bonega artikolo pri Esperanto en ties gazeto »Americas«. S-ino Muriel Collins Lambert, verkistino kaj lingvistino. Krome ĉeestis kelkaj aliaj gesamideanoj.

William Solzbacher.



Nia prezidanto Adolf Malík estas la 16-an de oktobro kvindekjara. Ni ĉiuj salutas lin ĉe tiu okazo amike kaj gaje, iom surprizite, ĉar ne multaj supozis, ke li renkontas Abrahamon dum aktiveco tiom viglanta. La redakcio ne intencas verki kritikan aŭ admiran biografion de homo staranta en kirliĝanta centro de nia batalado. Sed tamen estu permesite diri kelkajn konstatojn. Adolf Malík, filo el proleta, fervojista familio, estas esperantisto de sia 17-a jaro. Li naskiĝis en Přerov kaj esperantistiĝis en jaro 1917. Kiam li venis en 1945 post liberigo de nia nacio al Praha, li baldaŭ fariĝis unu el ĉefaj personoj inter esperantistaro en la ĉefurbo. Estas lia merito, ke Ĉeĥoslovaka Radio komencis en 1945 elsendi ankaŭ esperantlingve la informojn pri la politika kaj kultura vivo de ĉs. laboranta popolo. Plua lia grava faro estas starigo de la Instituto de Esperanto-Servo kaj eldonado de ĝia monata informa bulteno de ti redaktata kaj de biblioteko de informaj broŝuroj. Ankaŭ tie ĉi resono ĉe la eksterlanda legantaro firmigas pozicion de Esperanto kiel ilo por disvastigadi laŭverajn informojn pri ĉeĥoslovakaj vidmanieroj kaj por servi tiamaniere al konservo de la paco. Elektite prezidanto de nia Asocio la 20-an de jan. 1946 Malík baldaŭ fariĝis montranto de politika linio, kiun nia organizo sekvas en nova Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ en tiu ĉi sfero li vidigis penetreman rigardon kaj dialektikan pensadon, kiuj sukcesis starigi nin en publika vivo ĉeĥoslovaka sur lokon respondan al progresema tendenco de nia movado. Kaj por tiuj, kiuj ne konas lin persone, estu aldonite, ke Malík tiom konata pro siaj perradiaj paroladoj estas krome koninda almenaŭ ankaŭ pro sia talento pentrista. Li ja desegnas kaj pentras amatore same bone kiel li parolas. Sed mi supozas, ke tio ne estas ĉiuj liaj talentoj. Ni rajtas atendi de li ankoraŭ plurajn farojn. Ni parolos pri ili detale post pluaj dek jaroj.

Karel Procházka sepdekjara, la 1-an de oktobro, unu el la plej laboremaj pioniroj antaŭ la unua mondmilito. Li naskiĝis en Havlíčkův Brod. En j. 1906—1914 li faris multajn paroladojn en Praha kaj en pluraj aliaj urboj, estis inter fondintoj de la Bohema Unio Esperantista, ĝia komitatano, vicprezidanto de E. K. en Praha, kunaŭtoro de Sistema lernolibro eldonita de Ed. Kühnl, kunaŭtoro de la unua detala vortaro ĉeĥa-esperanta (E. Kühnl—K. Procházka) el 1914, ĉefa aŭtoro de la unua granda traduko el la ĉeĥa »Avineto«, kunlaborinto en pluraj gazetoj precipe en Časopis českých esperantistů. Post la milito li kunlaboris en reorganizo de la movado kaj fondo de la Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista. Kvankam nun iom malsaneta (landa konsilanto en pensio jam dum pluraj jaroj) li daŭre sekvas nian movadon kaj restas nia fidela membro. Tre modesta, li meritis pli multe da famo pro siaj verkistaj laboroj.

Ĉinaj laboristoj el la lako-industrio en Shanghai de la uzino Valet Paint & Varnish MFG Co LTD skribis esperantlingve al ĉeĥaj laboristoj de la sama fako petante por informoj pri niaj novaj socialistaj institucioj kaj aranĝoj. Ni transdonis ilian leteron el la 1-a de junio skribitan ĉine kaj en Esperanto, kun ĉeĥa traduko fare de nia ĝen. sekretario, al Centra Estraro de Sindikatoj la 21-an de julio kun peto transdoni ĝin al koncerna sindikato. Ĉar la nova Ĉinujo uzas Esperanton por informo de fremdlando en rimarkinda amplekso, certe la respondo de niaj laboristoj estos legata de multaj ĉinoj.

Somera Kolegio de Esperanto en Doksy okazis la 15—29-an de julio jam la kvinan fojon. Aliĝis sume 140 kursanoj, el kiuj vizitis kurson elementan laŭ Ĉe-metodo 51 (klasestro K. Solc), kurson progresantan 42 (klasestro VI. Severa), konversacian 34 (klasestro J. Vitek), seminarion 13 p. (klasestro J. Kožený). Anoj de kurso por Ĉe-metodaj instruistoj aŭskultis en kurso elementa kaj krome ricevadis instrukciojn aparte posttagmeze; gvidis ilin K. Šolc. Oratora kurso gvidata de Ant. Slanina estis kunigita kun seminario kaj partoprenis en ĝi ankaŭ progresintaj anoj de la kurso konversacia; krom la lecionoj en la lernejo kunvenadis ĝiaj kursanoj regule por praktika ekzercado en subĉiela teatro. Krom la nomitaj instruistoj instruis ankoraŭ direktoro de la lernejo Dr Aug. Pitlík, Dr Stan. Kamarýt, Václav Špūr, sume 8 instruistoj.

Krom la regula instruplano okazis ciklo de esperantlingvaj prelegoj en kiu parolis: MUDr Josef Černý: Artefarita aravediĝo ĉe la homo kaj Vivo el vidpunkto de atomismo, ĝiaj nunaj problemoj kaj eblecoj estontaj (po unu horo, 21. VII.). Ph Dr Aug. Pitlík: Fonetiko en Esperanto (du horoj, 24. VII.). Ph Dr Stan. Kamarýt: Fakaj terminaroj en E. (du horoj, 25. VII.). Karolo Pič: Ŝancoj de la E-literaturo (du horoj, 26. VII.). Ph Dr Stan. Kamarýt: Historio de la E-movado en ĉs. landoj (du horoj, 27. VII.). Adolf Malík: Faŝismo kaj socialista realismo (29. VII.). La lecionoj kaj prelegoj estis ĉiutage de la 8—12 horo, krome laŭ bezono ie la 14 aŭ 17 en lernejo aŭ en la subĉiela teatro. Krom la regulaj studentoj vizitis 17 frekventantoj okazaj diversajn lecionojn kaj prelegojn.

Ankaŭ la programo distra kaj kleriga, organizata, de Ant. Slanina, kiu en ĝi ankaŭ sukcesege partoprenis kiel humorplena anoncanto, estis akceptata kun daŭra entuziasmo. Interkonatiĝa vespero la 15-an de julio en salono de Jelen estis uzita por teknikaj kaj organiza informoj. Dimanĉon ie la 10-a horo estis en la sama salono solena inaŭguro de la kolegio. La kunvenon gvidis s-o V. Špūr. Post lia saluto alparolis la kunvenon prezidanto de la Loka Nacia Komitato s-o Hanousek akcentante gravecon de la Esperanto-misio en nia popoldemokratia respubliko. Post li fondinto de la kolegio s-o Karel Šolc skizis la komencojn de la kolegio kaj Dr Pitlík ĝian disvolvon dum la unuaj kvar jaroj. Ant. Slanina emfazis gravecon de oratorarto. Dr Kamarýt en nomo de la kolegia instruistaro dankis la studentojn por ilia sinediĉo al lingvaj studoj kaj emfazis la gravecon de la Lenina faro, kiu pruvis eblecon kaj neceson, ke popoloj amasoj estu konvinkataj pri vereco kaj adekvateco de la homa kono. Versimile el tiu fido al ebleco koni la veron rezultas oferemeco de komunistoj en strebado validigi la veron. Sinteno de esperantistoj estas tute analoga. Ankaŭ ili jam de la komenco de la movado kredas je ebleco trovi kaj koni socioologiajn leĝojn kaj tial

ili tiom volonte dediĉas tiom da laboro por efektiviĝi sian celon. Poste parolis en nomo de studentoj s-o Jeřábek akcentante belecon de la Doksy-panoramo kaj Doksy-etoson. Finis la vicon de parolantoj Asocia prezidanto Adolf Malík, kiu prelegis pri sinteno de nia movado al nunaj problemoj sociaj kaj socialismaj; kaj precipe pri nia senrezerve pozitivita sinteno al la popoldemokratia formo de nia ŝtato kaj politiko.

El prelegoj okazintaj dum vesperaj kunvenoj ni citu tiujn de J. Vítek pri liaj spertoj en Parizo kaj pri lia vojaĝo Svedujon. - El ceteraj programoj kulturaj ni citu teatron vesperon la 22. VII. fare de kvar membroj de la esperantista teatra kolektivo el Hradec Králové. Prezidanto de la Klubo J. Dolanský prezentis la ceterajn aktorojn kaj ĉefe klarigadis la prezentotajn scenojn. Valda Vinař kaj Eva Suchardová ludis »Amo per proverboj«, malnovan komedieton, kies drasta komikeco kaj naiva amindumo donas eblecojn ludi bone nur al bonaj aktoroj. Ili, ambaŭ estas tici. Tri specimenojn el »Voĉoj el malproksimo« kortuŝe deklamis F. Suchardová akompanate fortepiane de D. Motlová. V. Vinař deklamis impete kaj kun humoro la trian kanton el Bapto de Sankta Vladimiro tradukitan de Pumpr. D. Motlová ludis fortepiane kun virtuozaj ĉarmo pecojn el Mendelsson, Beethoven, Smetana. Scenon el RUR (Alquist kaj Helena) maistre ludis Vinař kaj Suchardová. La lasta programero estis draste komika sceno el La Ĝoja podio de R. Schwartz »La onklo estas bonhumora«, kiun ludis ĉiuj kvar aktoroj. Nivelo de la tuta vespero estis tre alta, oni eĉ tritis, ĉar oni vidis kaj aŭdis tiom da perfekteco. — Artvespero la 27. VII. estis same edifanta. Deklamataj poemoj Ĉe la Lago de Mácha [Pitlík] de Eva Nývltová kaj »Alaŭdeto« (F. V. Lorenz) de Anna Svozilová, versoj de Eli Urbanová kun muziko de prof. Štěpán Urban kaj ŝia »Rememoro« kantita de s-o Jakubec, pluaj specimenoj el »Voĉoj el malproksimo« deklamitaj de la tradukinto V. Vinař dum maistra piana akompano de profesorino Dana Motlová. »Fantaziaĵoj laŭ napolaj melodioj« de prof. Urban luditaj aĵtare de la aŭtoro, Privat-poemo kantita de Eli Urbanová laŭ melodio komponita de prof. Urban, satiraj versoj de Julio Baahv »Mi estas esperantisto« laŭ melodio komponita de Urban kantita per eminenta baso de s-o Šimek, kiu krome kantis arĉin el »Barbisto el Sevilla« kaj el »Najado« en traduko de Pumpr. Ĉiuj tiuj programeroj estis elstarantaj pro la traduklingvaĵo kaj pro la prezentmaniero same. Sed la plej efika programero estis tuj ĉe la komenco. La ĉeestantaj slovakaj gesamideanoj prezentis en popolkostumoj kantojn kaj dancfilmon kompilitan el slovakaj popolaj kantoj, maistre kunligitaj tiel, ke el ilia sinsekvo rezultis preskaŭ drama sceno. La junulinaj kaj junulaj voĉoj trilis, la voĉoj de maturuloj meditis, oni prikantis la amon, oni dancis la amon, eĉ la marŝo de kantantoj similis doncon, oni donis al la amo diversajn epitetojn, neniu estis frivola. Nun oni ofte parolas pri kolektivo. Do jen: ni vidis kolektivon kantantan kaj dancantan por alorigi ĝojon pro la vivo. La rolintoj permesu, ke ni danku ilin sen citi unusolan nomon individuon por honorigi tiel elstarantan kolektivecon de iliaj laboro kaj talento.

Ankaŭ programoj, kiuj celis precipe la distron, estis altnivelaj. Gravan meriton pro tio havas Ant. Slanina, kiu estris ĉiujn programojn kulturajn kaj amuzajn kaj funkciis ĉiam kiel nelaciablebla organizanto kaj parolanto en la aranĝoj. Li trovis helppantojn en Vinař, Kočvara, Jeřábek k. a., kiuj kapablis sekvi lin en liaj ŝercoj. Tjal ankaŭ improvizitoj programoj en vesperaj kunvenoj, dum ekskurso al kastelo Bezděz, en maska halo, dum sorĉista vespero ridiaĵis multajn kaj kontentiajn ĉiujn. S-o Rýznar aperis kiel unudaranaga sorĉisto kiu pleniaĵis tutvesperan programon per tre efektaj artifikajoj. Venecia nokto havis sian ĉarmon kaj maska ballo entuziasmon miksitajn kun adiaŭa nostalgio.

Al la triaj Floraj ludoj sendis kvar aŭtoroj 14 originalajn poemojn, unu prozaĵon kaj unu muzikaĵon. Dum la artvespero estis anoncanta rezulto de la konkurso, laŭ kiu estis premiitaj Karolo Pič, Valda Vinař, Eli Urbanová, Marie Kleinbauerová pro poeziaĵoj kaj Št. Urban pro prozaĵo.

La ekskurso dimanĉa al Kokořín, Mělník, Litoměřice, Roudnice, Terezín estis tre sukcesinta kaj instrua, traĵiro tra Terezín kortuŝa. La 27. VII. okazis posttagmeze plua

ekskurso al Mnichovo Hradiště (Waldstein-kastelo), kiu ankaŭ tre kontentigis la partoprenintojn.

Verda Voĉo redakata de Ant. Slanina havas novan titolbilden. Apud la Verda Voĉo estas legata Doksy ĉe Mácha-lago kaj Svit-Tatry, ĉar tiu ĉi unika esperantista tagĵurnalo dusemajna aperadis tiujare dufoje po du semajnoj, krom en Doksy ankaŭ en Svit. La redaktanto scias konservi la gajan humoron de la gazeto kaj samtempe variecon de la enhavo.

**Esperantista Somero en Karlovy Vary** la 9-an de jul. — 19-an de aŭg. konsistis el tri sinsekvaj dusemajnaj kursoj. La unua, por komencantoj, havis 15 partoprenantojn, ĉiujn junajn, la plej maljuna havis 23 jarojn. Instruis Ant. Reček, Mir. Vacek, Frant. Mašek, la dua, konversacia kurso por progresantoj, kunvenigis 20 p. kaj instruis en ĝi Koloman Kiss, Frant. Mílek, Frant. Mašek. En la tria, supera kurso por kursgvidantoj, partoprenis 18 p., instruis Rudolf Hromada, Dr Stan. Kamarýt, Josef Vondroušek. Administre gvidis kursaron Ant. Reček kaj Frant. Mašek.

La prelegoj okazis ĉiutage de la 8,30—12,30 horoj. Posttagmeze okazis diversaj ekskursoj en tre belan ĉirkaŭaĵon kaj la kursanoj partoprenis en la banloka vivo de la urbo, vizitis koncertojn, teatron, kinejon. La programo de la sezono estis tre riĉa, en la dua duono de julio okazis en la urbo Internacia filmfestivalo, dum la tuta sezono multaj altnivelaj koncertoj logis la muzikamantojn, danceblecoj altridis la dancemulojn, tre rimarkinda ekspozicio ebligadis enprofundiĝi en arton pentristan kaj skulptistan. Duan dimanĉon de ĉiu kurso okazis tuttaga ekskurso al Frant. Lázně, Cheb kaj Mariánské Lázně, kvidata de s-o Tichota. La lastan vendredon de ĉiu kurso okazis amika kunesto de kursanoj kaj de samideanoj el la urbo en la klubejo, kie oni amike diskutis kaj kantis. Inter tiuj ĉi vesperetoj precipe elstaranta estis tiu preparita de la dua kurso dum gvido de Koloman Kiss. La tria kurso preparis krome lundon la 21-an de aŭgusto en la kursa restoracio programon, kiun reĝisoris Jar. Dolanský, kaj en kiu partoprenis pluraj kursanoj deklamante, prelegante, rakontante kaj kantante. El ili ni citu almenaŭ prelegon de B. Vlčeková kaj deklamojn de Eva Suchardová.

La kursanoj kaj instruistoj loĝis en ĉambroj de pensiono Jantar kaj manĝis en apuda restoracio de la Instituto de Modernaj Lingvoj kune kun kursanoj de aliaj lingvaj kursoj de la Instituto. La loĝado estis komforta kaj la nutrado tre bona. Meritas donkon la aranĝantoj de la kurso pro tiu bona elekto de loĝ- kaj nutrad-eblecoj, meritas gratulon sekretario de la ŬRO-Instituto de Modernaj lingvoj pro sia komplezo, kiun kiu li zorgis pri materia bonfarto de la kursanoj. La fakto, ke ĉiu kurso, ne grandnombra, havis tri instruistojn, kaŭzis intiman rilaton inter la studentoj kaj instruantoj, kiu tre helpis al progresado de ĉiuj kursanoj. Vizito de la kursoj estis centprocenta.

La kurso estis entrepreno de Regiona Komitato Asocia sub protekto de Klerina Konsilantaro, la kursanoj ricevis ankaŭ instruadon politikan pere de membro de Regiona Sindikata Estraro kamarado Kolář. La kursanoj estis tre kontentaj kaj post ĉiu kurso dankis al la instruistoj kaj la aranĝintoj.

### Someraj Esperanto-kursoj en Rožnov

okazis de la 16 ĝis la 29 julio. Partoprenis ilin 60 p., po 20 en ĉiu kurso: komenca (instruis Vl., Slaný laŭ la Ĉemetodo), proaresanta (instruis J. Hojdys), supera (R. Hromada kaj J. Sattěk). Rezulto: 8 novaj instruistoj, 14 ekzamenitoj pri scio. La kursojn perfekte organizis s-ino M. Skarupová el Ostrava. Junularo el Ostrava zorgis pri ĉiutagaĵ programoj, en kiuj eminentiĝis violon-virtuozo s-o Tyrala, membro de la Ostrava Simfonia Orkestro. Laŭ la deziro de la prezidanto de la Loka Nacia Komitato (la urbestro) unu el la programoj estis ribetita en Societa Domo por la vasta publiko. Por tiu celo la urbo presiaĵis kaj afiŝigis invitilojn kun tre flataj vortoj pri la celado de Esperantistoj. Estis aranĝita tre sukcesa ekskurso al monto Radhošť kaj al la lago ĉe riverbarato en Bystřička. Aparte menciinda estas F-ekspozicio kun tre interesa materialo aranĝita de Ostrava-Junularo en tre konvena ejo sur la ĉefa placo. Vizitis ĝin 160 p. inter ili la urbestro.

**Somera kolegio de Esperanto en Svit** aranĝis sub la protekto de la loka ROH-grupo kaj helpe de SKE en Doksy de la 5.—19. VIII. sian unuan Esperanto-kursaron, al kiu aliĝis 166 gelnantoj (130 ĉeĥoj, 36 slovakoj). Direktoris Dro A. Pitlík, administris M. Novák el Svit. En 7 kursoj instruis slovakoj kaj ĉeĥoj: Dro L. Izák, Dro A. Pitlík, Zd. Raška, M. Seppová, A. Slanina, K. Šolc, V. Špūr, E. V. Tvarožek. El multaj kulturaj kaj amuzaj entreprenoj estas menciindaj: Aŭtoĉaraj ekskursoj al 1) la glaciĝroto Dobšina kaj stalaktita groteto Domica, 2) Ŝtrba-lago en montegaro Altaj Tatroj, vespero de slovakaj kantoj kaj dancoj, lumbilda prelego de Dro Izák pri la stalaktitaj grotetoj en Slovakio, Venezia nokto sur Ŝtrba-lago, bivaka fajro, somera karnevalo. Posttagmeze okazis kutime »amuzkonversacio« aŭ oni pogrupo ekskursis al proksimaj Altaj Tatroj, ĉiuvespere oni dancis en salonego de »Societa Domo«. Ĉiutage aperis instrua kaj amuzo gazeto »Verda Voĉo«, redaktata de A. Slanina. Je la fino de la kurstempo submetiĝis la lernantoj al skriba ekzameno, pri kies rezulto ili ricevis ateston. La radio-stacio Košice disaŭdigis intervjuon pri SKES. Detalan raporton pri la 1-a kurso de SKES vidu en »Esperantisto Slovaka«. (Bav.)

**Ekzamena komisiono** kunsidis ĉe fino de ĉiuj someraj kursaroj tiujare. Tio estis efektivebla relative facile, ĉar ĝiaj membroj instruis en ĉiuj kursaroj.

En **Doksy** la 29. VII. konsistis ekzamena senato el Dr. Stan. Kamarýt. prez., Ota Ginz kaj Dr. Aug. Pitlík. Anoncis sin 19 kandidatoj por la ekzameno pri scio 2 pri kapableco instrui.

Diplomon pri scio ricevis Václav Hoskovec el Nový Sloup, Vladimír Kočvara el Rokycany, Jaroslav Kopřiva el Krupka, Marie Macůrková el Olomouc. Frant. Motyčka el Letohrad. Jaroslav Mráz el Rokycany. Daniel Prandorf el Gottwaldov, Miroslav Racek el Plzeň, Jaroslav Suchánek el Chvalkovice, Alois Schwarz el Ústí n. L., Ladislav Polívka el Plzeň, Jan Toufar el Brno, Eliška Urbanová el Praha.

Diplomon pri kapableco instrui ricevis: Ph Mr Ondrej Hoffmann, apotekisto en Liptovský Sv. Mikuláš (hejma tasko: Kian signifon havas kolektado de medicinaj vegetaloj?)

Aristid Tinschmidt, profesoro en gimnazio en Turč. Teplice (hejma tasko: Eduko de la infanoj en la familio laŭ Makarenko).

En **Rožnov p. R.** la 29. VII. 1950 funkciis senato konsistanta el prof. J. Kožený prezidanta, Rud. Hromada, Ing. L. Krajič. Josef Vondroušek. Prezintis sin 14 kandidatoj al la ekzameno unuagrada kaj 9 al la duagrada. Rezulto de la ekzamenoj estis la sekvanta:

Diplomon pri scio de la lingvo ricevis: Marie Ambrožová el Brno-Židenice, Marie Červenková el Drahotuše, Terezie Endlová el Brno, Vlastimil Kočvara el Ostrava, Ondřej Macura el Ostrava, Karel Majtner el Ostrava, Marie Petrová el Liberec, Zdeněk Samek el Ostrava, Věra Sukačková el Třebovice ve Sl., Ludmila Šloufová el Plzeň, Dagmar Zezulová el Brno, Bohumil Zýka el Plzeň, Josef Poncza el Ropice u Těšína.

Diplomon pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis (en krampoj estas donita temo de la hejma tasko):

Miroslav Dumbrovský, studento en Háj-Chabičov (Petr Bezruč, poeto de Silezio).

Arnošt Haldys, teknika oficisto en Ostrava (La plej grandaj inventoj de la lastaj 50 jaroj).

Drahomír Kočvara, studento en Ostrava (Kiel la tekniko aliformas la mondon?).

Jaroslav Kuzník, libretonisto en Opava (La plan-ekonomio).

Ladislav Kyselý, komerca komizo en Ostrava (Historio de la ĉeĥa teatro).

Milan Neuwirth, modelisto en Ostrava (Junulara movado).

Antonín Odehnal, mineja oficisto, en Karviná (El la historio de la karbominado en Silezio).

Vilém Zelníček el Brno-Židenice (Prahistoria Moravio).

En **Karlovy Vary** la 19-an de aŭgusto funkciis kiel ekzamena senato Dr. Stan. Kamarýt, prez., Rud. Hromada kaj Jos. Vondroušek. Prezintis sin al duagrada ekzameno 4 sekvantaj kandidatoj, kiuj ĉiuj estis aprobitaj. Temoj de iliaj hejmaj taskoj estas enskribitaj en krampoj:

P. Stanislav Boršek, katehista en Přerov (Latina lingvo kiel lingvo internacia).

Jaroslav Dolanský, oficisto en Hradec Králové (Tipografo rakontas).

Ph Dr Rudolf Pawlik, pensiulo en Ostrava (Neologismo en Esperanto).

Eva Suchardová en Týniště n. Orł. (Historio de la ĉeĥa teatro).

Sume estis klasifikitaj la unuagrada ekzamenatoj: 7 bonege, 9 tre bone, 7 bone, 3 sufiĉe; la duagrada: 5 eminente, 4 tre bone, 5 bone kapablaj.

Ĉiuj sukcesintaj kandidatoj akceptu nian gratulon kaj dankon pro sia sindediĉo al la lingvaj studoj.

**Verda stacio** dissendadis la 5-an de julio programojn de la kongresa koncerto en Brno konservitajn sur bendo; la kantantaj voĉoj sonoris. La 2-an de aŭgusto estis ripetata de sur bendo »La maja fabelo«; en Brno tiam furiozis fulmotondro, tial sur ĝia ondo oni en multaj lokoj nenion aŭdis; meritas esti enskribita, ke venis ne unu plendo, kio estas tre konvinka pruvo, ke oni efektive aŭskultas kaj estas nekontenta nenion aŭdinte.

La 6-an de septembro estis dissendata radio-filomo »Ĉeĥoslovaka junularo«. En la komenco s-o Slanina salutis la aŭskultantojn ĉe la komenco de la aŭtuna sezono kaj respondis al diversaj korespondintoj. Poste eksonis VIII-a slava danco de Dvořák kaj post ĝi voĉoj de s-oj Slanina, Nývlt, Bobek, Neuman, Mařík skizis sintenon de ĉeĥoslovaka junularo al samtempaj problemoj kulturaj kaj politikaj. Estis tre klare kaj konvinke dirite, kial nia junularo havas unusolan organizon »Asociion de ĉeĥoslovaka Junularo« kun unu miliono da membroj. Ĝi ja havas taskon neniam ĝis nun donitan al iu junulara organizo: Forigi minacon de la milito. Por tia heroo celo gvido el unusola centro estas nepra kondiĉo. Temas pri instalo de nova ordo socia, en kiu ne ekzistos ekspluatado de homo fare de alia homo. Sed la nova ĉeĥoslovaka junularo spite pena laborado pri tiu sia grandega celo ne estas malgaja; neniam oni tiom kantis kaj dancis kiom nuntempe en nia lando. Poste sekvis radiofilmo de ĉs. popolaj kantoj kantitaj de ĥoro de la meza lernejo en Gottwaldov (70 personoj) kondukata de Frant. Blaha, plane akompanata de Dr Kubásek. Solkantis Josef Forman kaj Eva Paterová. Tre agreble impresis varieco de la kantoj. En la fino eksonis rusa kanto tre populariĝinta inter ĉeĥoj post la liberigo »Mi fumis tabakon« kaj impone finis la vicon »Paco-kanto de la nova junularo«. La programo daŭris de la 23,00 ĝis 23,44 horo. Certe ĉiuj aŭskultis ĝis la fino, sonoreco de la voĉoj malebligis fermi la aparaton pli frue.

**Telefona esperantlingva interparolo inter Norvegio kaj Ĉeĥoslovakio.** Norvego Olav Thormodsen el Haugesund vokis telefone la 10-an de junio 1950 sian korespondantinon Eva Suchardová en Týniště n. Orł. La interparolo daŭris 9 minutojn. Ili aŭdis sin reciproke tre bone, kaj ambaŭ estis tre kontentaj por bona funkciado kaj de Esperanto kaj de la telefono. Tiu interparolo estis ĝisnun unusola telefona interparolo inter Haugesund kaj kontinento. Norvegaj ĵurnaloj »Haugal« kaj »Havis« el 12. VI. 1950 raportis pri tiu ĉi okazintaĵo.

**Junulara sekcio de Slovaka Esperanto-Societo** aperigas ciklostilitan bultenon »Antaŭen Junularo!« Unua numero kvarpaĝa aperis en marto 1950. Adreso por korespondantoj Milan Lezo. Bratislava, Petržalka, Sadová 3/I.

**Radio Praha** ĉesigis la 17-an de septembro 1950 ĉiujn esperantlingvajn disaŭdigojn. Samtempe estis ĉesigitaj ankaŭ pluraj aliaj elsendoj fremdlingvaj sur mallongaĵoj. La tago de la lasta esperantlingva disaŭdiĝo estis ĝuste tiu, en kiu la disaŭdiĝoj antaŭ kvin jaroj komencis. En konferenco de ĉiuj radio-laborantoj sur mallongaĵoj ondoj en kiu oni raportis bri reorganizo de la programoj kaj pri la aĉspunaj rezultoj, ĉefredaktoro Vladimír Tosek en sia diskurso anonkis laboron faritan de la esperantlingvaj disaŭdiĝoj por nia popoldemokratia respubliko kaj ŝtato-organizo de post la j. 1945. La vortoj de la ĉefredaktoro estis aprobitaj per aplaŭdo de ĉiuj ĉeestantoj.

**Reprezentantoj de la UEA-gazetara servo** estis nomitaj de en nia komitato kunveno la 19. IX. 1950 Frant. Pytloun en Hradec Králové kaj Jiří Kořínek en Brno.

**BIBLION** aŭ **Novan Testamenton en Esperanto** aĉetos Vlad. Fiedler, Zieglerova 89, Hradec Králové I, kiu petas proponojn.

GRAMOFONDISKON »MELANKOLIO« (vidu paĝon 54)  
mendu senpere ĉe Gramofonové závody, Koblížná 1, Brno.  
Notu tiun ĉi novan adreson!

Liston de livreblaj libroj vidu sur p. 12!

## LINGVO

Překlad 27. textu:

Venis<sup>1</sup> la fino de la mondo kaj (la) kvin homoj, kiuj transvivis<sup>2</sup> ĝin, sidas ĉe tablo blanke kovrita<sup>3</sup> ankoraŭ<sup>24</sup> la katastroto — moka signo<sup>4</sup> de la iama<sup>5</sup> paco — sub lampo senforte<sup>6</sup> lumanta, kvin homoj, la patrino de la familio en Bítov,<sup>7</sup> Venta, Háta, Rosa kaj Martin, la mano de la maljunulino kuŝas<sup>8</sup> konsole<sup>9</sup> sur fermita pugno<sup>10</sup> de la filo, kaj Martin rakontas, la vortoj fluantaj<sup>11</sup> el lia buŝo kiel sango el vundo estas faciligo<sup>12</sup> por, li kaj por ili, ankoraŭ unufoje<sup>13</sup> revenas la sorĉa domo el la iluzia<sup>14</sup> pasinteco en la senkompata<sup>15</sup> realon de la kovrita tablo, sur kiu nefintrinkitaj glasoj da akvo,<sup>16</sup> salujo, ĉantranĉaĵoj<sup>17</sup> sur basta plado, estas kvazaŭ postlasaĵoj el la vivo de aliaj homoj, kiuj ankoraŭ antaŭ nelonge vivis ĉi tie kontente kaj pro ia kaŭzo<sup>18</sup> foriris. Kaj poste venas la migranta magiisto kun sia Mondo de Mirakloj,<sup>19</sup> la vortojn de Martin disŝiras spasmo, la fera rulcilindro de la sorto ekmoviĝas, la sango<sup>20</sup> ŝprucas el la frakasata<sup>21</sup> koro. La vizaĝo de Josef malmoliĝas, la trajtoj de Háta tremetas kaj sinjorino Baldwinová paliĝas, malvarma mano ekkuŝas<sup>22</sup> ŝian animon, ĉar anime ŝi vidas salikan branĉon malbon-aŭgure<sup>23</sup> elstarantan en la malplenon.

Poznámky:

<sup>1</sup>zde lepší než: estiĝis, ekestis, komenciĝis; <sup>2</sup>postvivis ĝin; travivi = proĝiti. Možno též zkrátit: kaj la kvin homoj postvivintaj ĝin...<sup>3</sup>manĝpreparita. Nikoli: sternita; sternita mŭže být jen tablotuko, tapiŝo, reto, kovrilo a pod., ĉili to, čím se prostírá; <sup>4</sup>ironia simbolo. Nikoli: mokinda = co je hodno výsměchu, ani mokita = kion (kiun) oni mokis; <sup>5</sup>estinta; <sup>6</sup>lace, senfortiĝe, nelĉerpite. Nikoli: senfortige = en maniero de senfortigado; <sup>7</sup>lépe en Bítov, aby bylo zřejmo, že Bítov je jméno místa, ne rodiny; <sup>8</sup>ripozas; <sup>9</sup>kvietige; <sup>10</sup>pugnigita mano; <sup>11</sup>torente fluantaj, torentantaj; <sup>12</sup>(pli) mildigo; <sup>13</sup>ankoraŭfoje; <sup>14</sup>fantazia; <sup>15</sup>nepardoneman, nekompateman, senindulgan, peto-spitan; <sup>16</sup>duonplenaj akvoglasoj; <sup>17</sup>distranĉita pano; tvary, jako tranĉdividita, tranĉpecigita jsou příliš těžkopádné; <sup>18</sup>ĉi kaŭzo; <sup>19</sup>Nikoli el ia kaŭzo; <sup>20</sup>mirindaĵoj. Miro = údiv; <sup>20</sup>většina překladatelů postihla tiskovou chybu křeč místo správného krev (stříká); <sup>21</sup>pisti je drtit v mozdíři; <sup>22</sup>ekpalpas; <sup>23</sup>minace, malbonsigne, malbonprofete; <sup>24</sup>vlož slovo: antaŭ.

Překlad zaslali: Aug. Blahutka, Vsetín; Jan Blažek, Strakonice; Alois Bobek, Turnov; Václav Duroň, Brno; Klem Hlobilová, Olomouc; Dra. Chlubnová, Brno; Dr. K. Chovan, Prešov; Ada Jermářová, Mar. Hory; Lad. Knittl, Praha; V. Kočvara, Rokycany; S. Konečná, Brno; Alois Kozárek, Skrbeň; Fr. Kubá, Olomouc; Alf. Macek, Bulhary; Jar. Mastník, Nelahozeves; G. Menšík, Plasy u Plzně; Jar. Mráz, Rokycany; Boh. Němeček, Dobřany; Jos. Odehnal, Gottwaldov; Ant. Paul, Domažlice; E. K., Ústí n. L. (Prokšková); Mil. Racek, Plzeň; Jindra Slavíková, Praha; Ant. Schöbllová, Beroun; Šreiberová, Zdoňov; St. Šumavanská, Praha; M. Wadasová, Olomouc; celkem 27 překladů. Mezi účastníky se objevilo několik nových slibných překladatelů.

(Hm.)

28. text k překladu.

Základní směrnici pro práci vysokých škol vytýčil na IX. sjezdu Komunistické strany Československa prezident republiky Klement Gottwald slovy: »Zkušenosti nás učí, že pro budování socialismu si musí pracující lid vytvořit a vychovat vlastní inteligenci, pocházející z jeho středu a s ním třídně a ideologicky spjatou.« V plnění této směrnice vstupují naše vysoké školy do rozhodující etapy svého vývoje.

Hlavním úkolem při uvádění vysokoškolského zákona a nových studijních plánů v život, hlavním článkem řetězu, který je třeba uchopit v práci vysokých škol, je požadavek, aby nová vysokoškolská inteligence byla podle slov presidenta Gottwalda vychována »v duchu nejpokrokovějšího světového názoru, v duchu dialektického a historického materialismu, v duchu marxismu a leninismu«. Z toho vyplývá, že veškerá věda, jejímž poznatkům se vyučuje na našich vysokých školách, má být pevně opřena o dialektický materialismus, aby to byla skutečně pravdivá věda.

(Miloslav Valouch.)

Překlady prosíme do 14 dnů po obdržení čísla.

ESPERANTISTA VIVO.

**Edziĝo.** Olga Mauerová, membrino de E. K. en Kladno kaj Vladimír Panovský en junio 1950. Sinceran bondeziron.

**Edziĝo.** Maria Budayová kaj JUC. Imro Havaš, sekretario de SES en Bratislava, la 23. IX. 1950.

**Edziĝo.** Samideanino Nóra Havasová, revizorino de SES, kaj Gejza Vörösmarty el Dyčka, la 5. IX. 1950.

**Edziĝo.** Oldřich Schwetter kaj Božena Horsáková anoj de la Esperanto-Rondeto Břeclav, la 1an de oktobro 1950. Bondezirojn al ĉiuj junaj paroj!

KORESPONDI DEZIRAS:

Bulgara studento Ivan Kolev, str. Dinju Nojkov 11, **Nova Zagora**. Bulgario kun ĉs. amikoj, intŝ. pm. kaj il pk.

G. va Hjen, Westwijkstraat, **Steenwijk**, Nederlando, F-ino M. Bakker, Zilverlaan 78, **Wolvega** (Nederlando). A. Kalverboer, Tuk 81, **Steenwijkerwold** (Nederlando).

O. Arai, 26 Nišisakuragi, Macugasaki, Sakjo-Ku, **Kioto** (Japanujo).

F-ino Maria Nasteva, 20-jara oficistino, en Bratin dol 9 **Sofia**, Bulgario, pri sporto kaj junulara movado.

Rondo de japanaj studentoj 10—23 jaraj laŭ adreso: Kuma-dai Ŝuugaku Rjoo, Kurokami-maĉi, Tsuboi-kjokukunai **Kumamoto-ŝi**, Japanujo.

## Propagační materiál

(letáky Esperanto—mezinárodní jazykové pojitko, Stručný přehled Esperanta, výstavní materiál, plakáty atd.) vyžádejte si ve Svazové kanceláři: Praha II, Malá Štěpánská ulice č. 7.

## Zkoušky z esperanta

Zájemci, kteří hodlají složit zkoušku z esperanta před Svazovou komisí, přihlašte se co nejdříve u tajemníka komise Dra Tomáše P u m p r a, Verdunská 8, Praha XIX. Zkoušky konají se budou v různých místech, podle stavu přihlášek. První v Hradci Králové dne 3. listopadu, druhá v Plzni.

## Kilianova učebnice

není dosud uvolněna. Přihlašte se o učební texty u Svazu.

Atentigoj.

**Nova presejo.** Sekve de la reorganizo de la presejo ĉi nova gazeto devas esti presata en Praha.

**Novaj kursoj.** Ni tre petas informi nin pri ĉiu nova kurso: kiu aranĝas, kiu instruas, laŭ kiu lernolibro aŭ metodo, kiom da kursanoj, kiam la komenco.

**Nova adreso de J. Ŝuster:** Praha I, Dlouhá 10.

## Resuma historio de la Esperanto-movado.

Krea periodo oni nomas jarojn inter 1878, kiam juna Zamenhof, la 5. XII. 1878, en rondo de Varsoviaj gimnazianoj festis pretigon de sia unua projekto de »Lingve Uniwersalia«, ĝis publikigo de ĝia definitiva formo la 14-an de julio 1887. Iu tempo finfine devus esti nomata antaŭhistoria, ĉar ekzistas tre malmultaj skribitaj dokumentoj pri evoluado de Zamenhofs verko.

German-slava periodo (1887—1896) estas tiel nomata, ĉar la unuaj aliĝintoj al la lingvo estis slavoj kaj germanoj. En Nürnberg komencis la 1-an de septembro 1887 aperadi unua esp. gazeto »La Esperantisto« redaktata dr. Chr. Schmiat kaj aĉpost 1890 de Zamenhof mem. Ĉefa kunlaboranto en Germanujo estis tiam Leopold Einstein (1834—1890), germana ĵurnalisto. Li estis grava propagandinto de volapuk, sed kiam li ricevis la unuan libron de Z., li konvinkigis pri supereco de E. kaj dediĉis al ĝi lastajn jarojn de sia vivo. Li verkis plurajn germanlingvajn broŝurojn, kiuj kreis fundamenton por la movado en Germanujo kaj servis pli poste kiel unua materialo por propagandistoj diversnaciaj, ankaŭ por la ĉeĥaj, precipe »La lingvo internacia als beste Lösung der internationalen Weltsprache problems« »La Esperantisto« fariĝis ligilo inter adeptoj de la juna movado. Króme eldonadis Zamenhof Adresaron de esperantistoj, kajerojn po mil adresoj. La unua aperis en 1889, broŝuro de 39 paĝoj, pluaj aperadis laŭ bezono kaj ebleco. Eldonado de »La Esperantisto« estis entreprenó monperda, la nombro de abonantoj neriam transpasis malmultajn centojn. Plej multaj estis en Rusujo. Zamenhof baraktis tiam por trovi loĝlokon taŭgan por sia kuracista praktikado kaj plurfoje devis transloĝiĝi. Kiam en 1891 aperis neebleco eldonadi la gazeton pro absoluta manko de monrimedoj, aperis germano W. H. Trompeter (1838—1901) termezuristo en Schalke, prenis sur sin ĉiujn elspezojn de la gazeto por tri jaroj (1892—1894) kaj pagis krome monate 100 markojn por la redaktoro. Li liveris multan materialon al la gazeto kaj verkis kun Christian Schmidt lernolibron por germanoj. En 1890—1894 okazis en la gazeto vigla diskuto pri reformoj. Zamenhof devigite de multaj postuloj, publikigis en 1894 plenan projekton de reformoj por decida prijuĝo; ĝi estis per voĉdono de abonantoj malakceptita en novembro 1894. Multaj reformemuloj nekontentaj pro rezulto de la voĉdono forlasis Esperanton. Sed la lingvo liberiĝinte de senfruktaj kaj senŝancaj diskutoj povis de tiam praktike disvolviĝi kaj ĝi tiel bone prosperis, ke kelkaj el eminentaj reformemuloj revenis al la movado, inter ili Grabowski. Ankaŭ en 1894 aperigis Zamenhof sian tradukon de Hamleto; tio estis la plej granda bato kontraŭ reformuloj.

En 1895 estis al »La Esperantisto« malpermesite de la rusa cenzuro veni en Ruslandon kaj ĝi devis tial ĉesigi en junio sian aperadon. Sed jam en decembro de la sama jaro grupo de svedaj esperantistoj en Upsala komencis eldonadi monatan revuon »Lingvo Internacia« redaktatan de Vladimír Gernet (1870—1874) el Odesa. Ĝi transprenis funkcion de »La Esperantisto«, fariĝis ĉefa organo de la movado kaj aperadis (de 1904 en Parizo) ĝis 1914.

Esperantlingva literaturo el tiu ĉi unua jardeko respegulas la kvar naciajn literaturojn, kies lingvoj estis pli malpli konataj de Zamenhof kaj de liaj unuaj disĉiploj Grabowski, Kofman, Borovko, Deviatnin, de Wahl, Gernet. Aperis tradukoj el Goethe, Heine, Byron, Shakespeare, Puŝkin, Lermontov, Prus, Sienkiewicz, ja eĉ unuaj kantoj de liado. Grabowski alportis apartan talenton en frazkonstruado kaj enkondukis multajn novajn esprimojn.

Franca periodo (1896—1904). En Francujo komencis disvastiĝi E. en 1896 dank' al agado de Louis de Beaufront (1855—1935), privata sciencisto, viro de nekutime altnivela klereco strange nesistema, ruinigita nobelo, kiu vivtenis sin kiel guvernisto de la filoj de amiko, la grafo de Maigret, posedanto de unu el la plej famaj ĉampanaj

firmoj. Li publikigis artikolojn, propagandilojn kaj lernolibrojn (la unuan en 1892, la piej gravan Comentaire sur la grammaire e. en 1900) kaj en januaro 1896 li fondis revuon L'Esperantiste kaj Societon por propagandi esperanton, kiu baldaŭ poste aldonis en sian titolon Franca kaj kies nomo Societo Franca por Propagandi Esperanton (SPPF) fariĝis la plej tama inter la naciaj societoj. Kiam la SPPF estis fondata, ekzistis ankoraŭ tre malmultaj esperantistoj en Francujo. Krom la fondinto estis la ĉefa persono Gaston Moch (\*1859 en St-Cyr), eksficiro de artilerio, pacifisto kaj aktiva membro de la Dreyfusana »Ligo por la naciaj Kajtoj«. Moch per artikoloj en sciencaj revuoj, Beaufront per persona konvinkado akiris vicon de devomaniere eminentaj homoj kunbatalantaj. Ni citu sole: René Lemaire, doktoro pri juro, komercisto en Epernay, Ernest Naville iama profesoro pri filozofio en Genevo, Generalo Hippolyte Sébert unu el la monaĝaj aŭtoritatoj pri balistiko, membro de la franca Scienca Akademieso, teknika direktoro de potenca sialinaustria firma, kiu tarigos larĝvida meĉeno de la movado kaj unu el ĝiaj organizantoj. Tamen nur la jaro 1900 prezentas la veran starton de la franca movado. La 10-an de januaro Charles Lambert (\*1866), profesoro pri franca literaturo en Dijona fakultato, taras paroladon, kiu konvinkas plurajn liajn kolegojn, inter aliaj Carlo Bouriet kaj Emile Boirac; sekvantan jaron aliĝas Th. Cart; ĉiuj ludontaj rolojn eistarajn. En 1900, en kongreso de la »Asocio por progresigo de la Sciencoj« estas proklamita de Louis Couturat kaj Léopold Leau tondo de »Delegacio por Aĉpreni de Hejpa Lingvo Internacia«, al kiu rajtas aliĝadi ekskluzive universitaj profesoroj kaj membroj de Sciencaj Akademioj. Iu akirado de »elstaraj nomoj al movado, instiganta al mokaoo, estis grava venko. Sed jam konturigas en ĝi ĝermo de krizo. Voĉoj de portantoj de tiuj ĉi tamaj nomoj alkutimiĝis ordoni kaj malvoionte cedos al opinioj de la sennoma amaso. Ardo de virtoj demokratiaj brilos sole el Boirac kaj Sébert.

»L'Esperantiste« estis redaktata tre zorgeme kaj inteligente plejparte en paralelaj tekstoj franc- kaj esperantlingvaj. Tio estis eminenta lernilo por redaktantoj, verkantoj kaj legantoj. La Beaufronta revuo tre influis esperantistojn en ceteraj landoj. Beaufront elpensis tre etikan metodon propagandan; pledante por lerni Esperanton li asertis pri sukcesoj ĵus akiritaj en landoj aliaj. Iu ĉi metodo estis imitata fervore kaj kun sukceso. Fondiĝis gazetoj kaj propagandaj societoj en multaj landoj, ankaŭ transmaraj. Ekz. en 1902 aperas »La Lumo« en Montreal (Kanado) kaj en 1904 »La Meksika Lumturo«. En Bystřice p. Host. aperis en 1902 »Bohema Esperantisto«. Kreskas nombro de novaj eldonaĵoj, aperas unuaj originalaj verketoj, detalaj naciaj vortaroj, fakaj tekstoj en Internacia Scienca Revuo kaj Espero katolika. (Daŭrigo.)

## Traduko de la 3-a ekzerco.

1. Ni laboras sturmulmaniere por konservi la pacon. 2. Li veturis al Doksy por trovi samideaninon. 3. Por vivi oni bezonas monon. 4. Por perfektigi oni bezonas energion. 5. Lerno por esti saĝa. 6. Mi volas, ke vi lernu. 7. Si ne venis. Anstataŭ atendi ŝin, li iris en kinejon. 8. Anstataŭ dormi li legis la tutan nokton. 9. Mi konsilas: Foriru sen diri unusolan vorton. 10. Antaŭ ol foriri li razis sin zorgeme.

**Cviĉeni 4.** (V tomto cvičení jedná se hlavně o novodobé výrazy.) Přeložte:

1. Naši předkové neznali traktory ani mlátičky. 2. V červenci a srpnu jdeme na brigády pomáhat sklízet obilí, v září pomáháme sklízet řepu, brambory a chmel. 3. V zemědělství byl plán splněn na 105 procent. 4. Země patří tomu, kdo na ní pracuje. 5. Naše železnice dopravily letos více cestujících než loni. 6. Osvobození Prahy Rudou armádou se stalo historickým datem. 7. V oknech se objevily rudé prapory. 8. Úderníci do prvních řad! 9. Každý člen Svazu československé mládeže úderníkem! 10. Stalinský plán přetvoření přírody bude uskutečněn.